Nº 70 - Januaro/Februaro 1970 - 1,20 F

# LA JUNA PENSO

Sekretario | Kdo Christian Baudé, F 47 - Laroque-Timbaut (Francio)
Redakcio | Kdino Katja Lödör, Brusselsesteenweg 335, Gentbrugge (Belgio)
Poŝtkonto | 3374 04 Bordeaux - La Juna Penso, 7 rue Caussade, F33-Bordeaux

# LA BATALO POR la HOMO

Enhavo

1 La batalo por la homo
2 Manlibro de nova homo (Rufegon)
3 Nia debato: Vera Socialismo
(H.Armony, Corrie, JC, Hodo, Hoko, Kribo, Mikajim, Martine, Najtingalo, Otisto, Pelle)
13 Pri "Neoficialaj vidpunktoj pri Svedio" (Egon Göransson)
14 Armonismo=cionismo=imperiismo (Branko Miŝkiĉ)
Pensoj en la aeron (Dodinet)
15 Iĝis kutimo en Gent (Papalago)
16 Poezio: Dakapo, Josef Burger
Krucvortoj (kdo Milon)
Gejunuloj aktivas en Rotterdam (laŭ Inge K.)
17 Eĥoj el LJP-administrejo
Korpo kaj animo
Unua SAT-junulara renkontiĝo
18 Niaj adresoj.

""""""""""""""""""""""""""""""""""

Kontribuis el | 21 kunlaborantoj
10 landoj.

""""""""""""""""""""""""""""""""""

LJP estas dumonata.
Por aboni, legu p.18

"La junulfako de S.A.T......
atentigas pri la danĝero de ĉiam pli kaj pli venenitaj aero, akvo kaj tero pro ĉiuspecaj kaŭzoj, k simpatias al la asocioj, kies celo estas protekti la naturon..."
(El la rezolucio de Novi Sad)

Estas du batalspecoj: tiuj, kiujn la homoj faras inter si kaj de kiuj plenas la Historio - kaj tiu, kiu konsistas batali por la Homo, por ties postvivado kaj ties florado. La unuaj bataloj estas stultaj kaj kontraŭnaturaj, ĉar ili ne kalkulas kun la specia solidaro, kiu rolas en ĉiuj pli malpli evoluintaj animalaj specioj. Male, la batalo por la Homo situiĝas en la natura ordo kaj tiujn, kiuj plenumas ĝin, oni povas konsideri kvazaŭ reenkarniĝo de l' "Specia Genio", kiun elvokis la biologoj de l'XIXa jarcento.

Ĉiam ekzistis elit-individuoj, kiuj kondamnis la militon, la subpremon kaj, ĝenerale, ĉiujn manifestojn de malafablo, kruelo, brutalo. Sed nur niaepoke la batalo por la Homo ekprenis sian grandan signifon. Fakte kaj sendube la unuan fojon de kiam ĝi ekzistas, la homaro riskas perei proprakulpe. Kaj dirante tion, mi ne nepre pensas pri termonuklea milito. Povus esti, efektive, ke tiu milito neniam okazos kaj ke tamen la homaro detruos sin per tute pacaj kaj laŭleĝaj rimedoj, kio estos la zenito!

(daŭrigo p.2)

LA BATALO POR LA HOMO...

Sufiĉas por tio, ke la - jam survoja - venenigo de l'biosfero pludaŭru plifortiĝante. Kion ĝi farus nur partoprenante la akceliĝon kiu karakterizas ĉion tuŝantan la Modernan Civilizon. Nu, estas ĝuste ĉi-lasta, kiu kulpas la ĥemian kaj industrian venenigon de l'aero, de l'akvoj, de l'maro, de l'grundo, kaj sekve, de nia nutraĵo, sen paroli pri amaso da aliaj, malpli gravaj "stress", sed kiuj ankaŭ kunhelpas al nia persona dekadenco kaj al la dekadenco de la tuta specio: la neracia loĝejo, la paperaĉaj tedaĵoj, la manko de korpekzerco, la ĥemioterapio, la bruo, la nerva tensio, k.c. Al ĉio ĉi necesas aldoni internan danĝeron, almenaŭ tiel gravan kiel la elekstere minacantaj danĝeroj, nome la malhumaniĝo de l'Homo, kun ĉio de ĝi implicata: perdo de morala konscienco, de digno kaj entuziasmo.

La dramo estas, ke tiu difektiĝo okazas laŭ insida, apenaŭ perceptebla maniero, kaj ke la plimulto de niaj samtempanoj eĉ ne konscias ĝin. Uzante bildon, ni povus diri, ke temas ne pri brutala eksufoko, kiu igus nin frakasi la fenestrojn aŭ pordon por ekhavi aeron, sed pri malrapida asfiksio, kaj por iuj, preskaŭ eŭforia. Oni agonias kaj mortas en la komforto! Cetere, la Gazetaro, la Radio, la Televido ĉeestas kaj ĝenerale provas trankviligi nin, redoni al ni fidon en la Progreso, kiu, laŭdire, kondukos nin al la or-tempaĝo. Tion ĝi povus, fakte, sed por tio necesus, ke la homoj kiuj tenas la gvidilojn rapide ekkonsciu pri la realaj nin minacantaj danĝeroj kaj agu konsekvence. Momente tio ne okazas kaj tio estas drameca, ĉar, ju pli pasas la tempo, des pli graviĝas la danĝeroj. Kaj tiam stariĝas la demando: Kion fari?

Miaflanke, mi vidas nur du eblojn:

Unue, provi tuŝi tiujn, kiuj regas nin. Malfacila tasko, ĉar kiuj normale devus atenti tiujn problemojn kaj provi solvi ilin, tiuj ne havas la tempon por tio. Ankaŭ la "tempmanko" estas malsano de nia jarcento kaj ŝajnas plej trafitaj ĝuste la plej alte lokitaj personoj.

Due: informi la plej grandan nombron da personoj pri la danĝero reprezentata de la difektiĝo de nia vivmedio kaj de la kontraŭnaturaj vivkondiĉoj, ekkonsciigi ilin pri la graveco de la situacio. Mi bone scias, ke ankaŭ tio ne estas facila, sed mi vere ne vidas kion alian ni povus fari.

Ĉiukaze io estas certa: ekde kiam aperos vasta movado de publika opinio favore al la protektado de l'biosfero kaj al nova maniero pensi kaj vivi, de tiam la ĉiulandaj gvidantoj estos devigataj kalkuli kun ĝi, eĉ se nur por konservi sian postenon. Se ne, ili fatale estos antataŭitaj de kiuj, atentemaj al tiu nova fluo, enskribos ĝin sur sia balot-programo.

El tio ambaŭkaze rezultas, ke nia agado havas ĉiujn ŝancojn sukcesi. Por atingi tion, nura kondiĉo: ke la batalantoj POR la Homo estu sufiĉe nombraj por konsistigi forton, kiu kapablos tute nature trudiĝi tra la plej demokrataj vojoj kaj por ĉies plej granda profito.

G. Krassovsky

(El "Esprit Libre" - Libera Spirito -, franclingva bulteno de l' Batalantoj POR la Homo, aŭtuno 1969. Adreso: 7, rue Boucicaut, PARIS-15. Trad. KB, kun la permeso de la aŭtoro)

..........................................................................

Manlibro de nova homo (Rufegon)

1. Kiu estas via esenco ?

Ĉu tio kun kio vi naskiĝis, tio kun kio naskiĝis kiu ajn homo? Demandu tion al vi mem. Se vi ne sentas la bezonon respondi tion, tio estas ke la homa esenco mortis en vi. Oni surtretis ĝin. Oni eĉ ne permesis ĝian kreskon. Tiam estas nenio por vi.

Estas io nur se vi tute detruas ĉion kio vi estas, tion kio malpermesas eĉ realigi la demandon. Estas io nur se vi vekiĝas. Aŭ renaskiĝas. Estas vero. Vi trovos tion malfacila.

..........................................................................

JUNULARA RENKONTIĜO EN NANCY (Francio) 16/18. de majo 1970

Ĝin organizas la nancia esperantista junularo. Restado tre malmulte kosta (amasloĝejo, tendejo, eventuale hoteloj...). Aŭtostope, aŭtomobile, fervoje: facile atingebla loko ĉe la landlimo Francio-Germanio. Klarigojn petu de: "SAT-junularo" Hubert ROSSIGNON 34, rue Pasteur F 54 ESSEY-Les-Nancy (Francio)

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

Babeuf ?
Bakunin ?
Bauer ?
Bebel ?
Bellamy ?
Blanc ?
Blanqui ?
Blum ?
Buonarotti ?
Cabet ?
Castro ?
Cohn-Bendit ?
De Paepe ?
Duboin ?
Dutĉke ?
Engels ?
Fourier ?
Godwin ?
Guesde ?
Guevara ?
Ho Chi Minh ?
Huss ?
Jaurès ?
Kaŭcki ?
Kropotkin ?
Kun ?
Lafargue ?
Lassalle ?
Lenin ?
Liebkneĥt ?
Luksemburg ?
Lumumba ?
Maĥno ?
Malatesta ?
Malcolm X ?
Malon ?
Marcuse ?
Marks ?
Maŭ Zedong ?
Morus ?
Owen ?
Pannekoek ?
Platon ?
Proudhon ?
Reclus ?
Saint-Simon ?
Sorel ?
Spartako ?
Stalin ?
Sun Jat Sen ?
Stirner ?
Tito ?
Tolstoj ?
Trocki ?
Vandervelde ?
Volin ?
..........
listo laŭplaĉe kompletigota!



# VERA SOCIALISMO

Sin esprimis: Kdinoj Corrie (Roterdamo) k Martine (Ĝenevo); Kdoj H.Armony (Haifo), Hodo (Kadijako), Hoko (La Lupo), J.C. (Ĉeĥoslovakio), Kribo (Laroko), Mikajim (Francio), Najtingalo (Ĉeĥoslovakio), Otisto (Tulstrupo), Pelle (Stokholmo).

Otisto: La vorto socialismo aŭdiĝas hodiaŭ de multaj flankoj: por kelkaj tiu estigus la ĉielon aŭ paradizon sur la tero, por aliaj ĝi ŝajnas alporti la inferon. Iel ja pravas la lastaj, ĉar la nocio socialismo estas tiel misuzita, ke oni ne plu povas apliki ĝin senĝene por io bona kaj alstrebinda.

Hoko: Ni povas legi la sekvantajn klarigojn pri socialismo:
a) en la franca vortaro "Le Petit Larousse":
"nomo de diversaj doktrinoj ekonomiaj, socialaj k politikaj, kies komuna celo estas la kondamnado al la privata proprieto de la produkt- kaj interŝanĝ-rimedoj."
b) en la Plena Vortaro:
1. Socipolitika doktrino, kiu, pravigante sin ĉu per idealo de justeco k frateco, ĉu per la leĝoj de la ekonomia evoluo, rekomendas anstataŭigon de la nuna ekonomia organizo per nova organizado transdonanta la ilojn de produktado al la socio k rezultigonta komunajn vivkondiĉojn ne nur pli justajn sed ankaŭ pli favorajn al plena disvolviĝo de la homa personeco.
2. (Marksismo)- Socipolitika doktrino celanta forigi la plusvaloron, kiun profitas mastro, akcikompanio aŭ ŝtato el la laboro de siaj dungitoj, per starigo de celkonforma mastrumado.

Kribo: Plian fojon, la difinoj de P.V. certe helpas nin komenci la diskutadon sur relative firmaj bazoj. Ĉe "socialismo" troviĝas do du difinoj, kiuj, eĉ por nemarksistoj, ŝajne ne kontraŭstaras unu la alian. La unua ŝajnas nur pli idealisma, kontraste kun la seka aspekto de la historia materialismo.
(Kompreneble, nun restas du sintenoj: aŭ konsenti tiujn difinojn aŭ ne agnoski ilin, opiniante, ke ili estas nur parte, aŭ tute ne konvenaj, aŭ eble ne plu aktualaj.)

Mikajim: Ĉiuj aliaj ekzistantaj ismoj estas nur deflankiĝoj de tiu patrina koncepto, kaj celas nur kontentigon de iuj aŭ aliaj apartaj bezonoj, ĉu individuaj, ĉu kolektivaj, per pli malpli rabaj kaj gangsteraj procedoj, helpe de ruze falsitaj nocioj pri politiko, religio, nacio, eĉ scienco, partioj, okultaj sektoj, sindikatoj, hierarkio; per mono, armeo, militoj, revolucioj, strikoj, senĉesaj spionado, denuncado, trudo, subpremado, enkarcerigado, monpunado kaj mortigado, entute per ĉiuspeca kaj disiga ekspluatado de individuo fare : ĉu de alia individuo, ĉu de iu aŭ alia kolektivo. Jen la fonto de l'ĥaosa, nuntempa kaj tuthomara sociordo, "malkonsistigita" de fakta "malsocialismo".

Mikajim: Vera Socialismo,laŭ mi,estas deziro kaj zorgo socie organizi la Homaron cele, ke ĉiuj individuoj ricevu en kaj per la kolektivo,dum la tuta vivo kaj samegale por ĉiuj, la materian bazon necesan por la normala kontentiĝo de la naturaj bezonoj, kaj por la malvolviĝo de ĉiuj iliaj kapabloj,ĉu korpaj, ĉu spiritaj, por la plej granda bono de ĉiu kaj de ĉiuj.

Pelle: Vera socialismo por mi estas LIBERO, FRATECO kaj EGALECO, laŭ anarkistaj vidpunktoj, ĉar anarkismo estas preskaŭ la sola socialista teorio, kiu respektas la individuan LIBERON.

Anarkismo ne estas iu ekonomia sistemo,temas nur pri etiko.

La anarkistoj ne estas ligitaj al religiaj aŭ politikaj dogmoj, kaj ili estas pretaj diskuti pri ĉiuj problemoj rilate la interhoman kunvivadon.

Neniu temo estas tabua, nur libera diskutado garantias la homaran evoluon.

Kribo: Kio estas,laŭ mi, vera socialismo? Mi konfesas, ke ĝis nun mi neniam provis precize respondi tiun ĉi demandon. En la nuna mondo ekzistas landoj kaj partioj , kiujn la plimulto de la homoj - eĉ la subtenantoj de kapitalismo - nomas "socialistaj" . Ekzistas laŭdire Socialista Internacio, kiu paradokse aktivas nur en "nesocialistaj" landoj. Fine, por montri la duban sencon, kiun havas nun ĉi tiu vorto, mi ege miris, legante en franclingva libro eldonita de Larousse,ke la "demokratio" starigita de Degol en Francio estas ekzemplo de bone komprenita "socialismo"

H.Armony: Ekzistas en nia ne-tro-dolĉa mondo vagonoj da opinioj pri la vera socialismo...

Martine:...kaj same pri ĉiuj aliaj "ismoj" !

Hoko: Ni do komparu: Kolektivismo,Komunismo,Sindikatismo,Anarkismo...

"Kolektivismo: Socia sistemo, kiu starigas la kolektivan proprecon de ĉiuj produktrimedoj,anstataŭigas la kapitalistan konkuradon per socia organizo de la laboro, kaj dispartigas la kolektivajn produktojn proporcie je la kvanto de la plenumita laboro.

Komunismo: Socipolitika doktrino,kiu celas anstataŭi kapitalismon, detrui la individuan proprumon k bazi la ekonomian vivon sur komuneco de l'havo.

Sindikatismo:Socipolitika sistemo,laŭ kiu la laboristoj sindikate organizitaj k per revolucia striko akirintaj posedon de la produktiloj kaj sociaj riĉaĵoj,organizus kaj mastrumus socialisme la tutan socian vivon.

Anarkismo: Socia k politika doktrino, kiu baziĝas sur la principo de absoluta individua libereco k sur forigo de ĉia ŝtata regado; senregeco, senestreco.

Ne devas esti forgesitaj:

Bolŝevismo: Sistemo pri organizado de revolucia internacia movado politika,kies ĉefaj karakterizaĵoj estas: marksismo kiel doktrina bazo; celado al starigo de proletara diktatoreco...ktp (vd.PV)


Kooperativismo: Karakterizita ĉefe per asocio de laboristoj,kiuj anstataŭ doni al mastro sian laboron kontraŭ salajro,komunigas siajn ŝparaĵojn k sian laboron por praktiki mem industrion, al kies profitoj aŭ perdoj ĉiu el ili partoprenas.

Liberecana Socialismo: kiu celas starigi socion por k per la homo,t.e. ekonomian egalecon kaj homecan etikon, anstataŭigante la aŭtoritatajn instituciojn per sociaj, fratecaj, homaj rilatoj en la produktaj kaj distribuaj rimedoj.

Porabunda Socialismo: kiu tre similas al liberecana socialismo. Tiu socialismo aŭ disdona ekonomio baziĝas sur tiu principo: Ĉio utila kaj materie ebla devas esti finance ebla kaj realigota. T.e. financo ne plu devas estri la ekonomion, sed male financo devas esti je la servo de ekonomio. Sekve: socialigo de la produktrimedoj, disdonado de la produktaĵaro pere de disdona mono neinterezoproduktopova. (La aktuala papera k banka mono ne plu havas valoron per si mem , estus tre facile per socia dekreto aŭ leĝo aŭ eĉ per simpla popola volo,anstataŭigi ĝin per disdona mono.)

Kribo: (kiu enpoŝigas ŝvittukon):

Por ke ni povu debati pri tia temo, sen fali en akrajn disputojn inter diversopiniantoj,ŝajnas necese,forigi ĉiun pasion kaj momente forgesi la sloganojn uzatajn de la laboristaj organizoj,al kiuj la plejparto el ni apartenas. Ĉu tio estas tro postuli de ni? Certe ne,ĉar kiel ni povus troviĝi hejmece en SAT, se ni ne reagus kontraŭ ĉiuspecaj dogmismoj?



# E S E N C A J   K A R A K T E R I Z O J
# e n   V E R A   S O C I A L I S M O


Kribo: Kdo HOKO citas diversajn doktrinojn, kiuj celas - almenaŭ oficiale - starigi socialismon. Anstataŭ aparte analizi ĉiun, ni prefere menciu kiujn karakterizojn ni persone konsideras esencaj en vera socialismo.

## Produktrimedoj kaj distribuado:

Hoko: Resume kaj en ĝenerala senco, socialismo celas materie la kunlaboradon de ĉiuj homoj por la produktado de la vivrimedoj, plenumadon de la servoj k kontentigon de la esencaj bezonoj de la tuta homaro.

Otisto: Laŭ mia kompreno, socialismo volas krei fratecon, justecon k la plej liberan evoluon de la individuo por/per:
- ekposedo de la produktaj rimedoj far la socio;
- forigo de la nuna monsistemo k forigo de la interezo.

En Danio ekzistas banko, kiu pruntedonas monon sen interezo, sed kompreneble oni ankaŭ devas enmeti sian monon sen ricevo de interezo. Do, por tiu, kiu volas subteni tian sistemon, komencu per membriĝo en tiu banko!



Hodo: La necesaj financoj por la industrioj ne plu venusel bankegoj, nek el kapitalistoj nek el akcikompanioj, sed el speciala socia servo, kiu disdonus monon, ne interezdonan verdire.
La iloj aŭ maŝinoj estus la komuna posedaĵo, kaj ĉiu zorgus por unuaranga celo: profiti laŭ racia mezuro sian laboron, ne por rapida kaj ega profito.

Kribo: Devas kontroli la produktorimedojn kaj la distribuadon la laboristoj mem, aŭ, en la kazo de aŭtomata produktado, la konsumantoj mem. Tio povas okazi eventuale pere de sindikatoj, kies respondeculoj estu prezentitaj kaj elektitaj far la laboristoj mem. Tiuj sindikataj responsuloj estu sisteme eksigeblaj post certa tempo kaj eventuale tuj eksigeblaj se plimulto da laboristoj decidas tion. Tamen gravas la risko pri transformiĝo de la sindikata gvidantaro en ĉiondecidan burokrataron!..

Otisto: Dezirata estas ankaŭ abundo: por efektivigi tion, la laboro ne devas ĉesi, kia ajn estas la sistemo, kaj transiro subita de la tuta merkato al centrala labordistribuanto farus kaoson.

Kribo: Laŭ mi, ne nepre necesas, ke abundeco regu por starigi socialisman sociordon. Ĉiu ricevus:
- laŭ sia bezono por la abundaj varoj (distribuado);
- laŭ la kvanto disponebla, por la ankoraŭ ne sufiĉaj varoj.

La distribuado funkcius eventuale per konsummono, ekzemple valida nur unu jaron.

Otisto: Kial mono en si mem estas io malbona, aŭ la interezo ? Ĉu vi pruntedonus sufiĉe grandan monsumon al konato sen ia rekompenco?

Iu: Nu, jes! Ankoraŭ ekzistas tiaj malprudentuloj en nia mondo!...

Hodo: Kooperativismo, almenaŭ la vera, estas ebla se ĉiu atentas du punktojn:
Unue, ne serĉi grandan profiton, ĉar ĉiam ies profito trudas al la aliaj (vd. la kapitalismajn landojn.)

## Libero kaj respondeco

Hodo: La dua punkto estas: ke ĉiu estu sia propra mastro. Tio ne estas facila: en sistemoj, eĉ socialistaj (siadire), sed ne reale kooperativaj, iu organizo (ŝtata aŭ alia) anstataŭigis la tradiciajn mastrojn sed ĉiu elemento de la socio ne havas realan kompletan respondecon.

Kribo: Socialismo ne povas ekzisti sen libero. Tial por mi socialismon ne povas trudi elita gvidistaro.

Corrie: Oni devas havi la rajton kritiki kion diras la estroj, kiuj cetere ne havu pli da rajtoj ol la aliaj homoj kaj eĉ havu la samajn devojn kiel ĉiu. Tiuj estroj havu nur la taskon gvidi la aferojn ĝustamaniere kaj cetere estu kapablaj organizi ĉiun ajn aferon kaj disdoni la taskojn inter la aliaj, kiuj havu kiel devon ĉiel kunlabori laŭ sia povo.

Hodo: En ĉiuj laboraj rondoj, ne plu estu aŭtoritataj mastroj, sed por la sama afero asociiĝu homoj, kiuj verdire elektis la plej kapablajn elinter si por direkti en la bona produkto.
Konsekvence, la individua libero ne plu ekzistas en sia tuto; ĉiu devas labori per kaj ĉefe por la komunumo.

Iu: Labori, labori... ĉiam labori! Kiel tede!

Mikajim: Vera socialismo devas trude celi al harmoniigo de la rilatoj inter individuoj kaj kolektivo. Individuo kaj kolektivo, ambaŭ konsistigas la du nepre nedisigeblajn "naturojn" de la tuthomara korpo. La rilatoj inter ambaŭ devas analogi samtempe tiujn inter edzo kaj edzino kaj tiujn inter patrino kaj infanoj.

Unu por ĉiuj, ja! Sed ankaŭ ĉiuj por unu.

## Egaleco

Pelle: Por la anarkisto EGALECO signifas, ke ĉiuj individuoj samvaloras. (Nek superulo, nek subulo). Ĉar en komuna socio neniu individuo povas vivi sendepende de aliaj individuoj. Personoj aŭtoritatecaj ne havas admirantajn amikojn inter la anarkistoj. Ĉar la anarkisto mem volas nur esti respondeca pri siaj agoj. La anarkisto ne diras: Jes, mi scias, ke mi fiagis kontraŭ miajn kunvivantojn, sed mi agis nur laŭ ordonoj de niaj gvidantoj. EGALECO devas baziĝi sur la respekto al la individuo, ĉar la socio konsistas el individuoj. Sen individuoj neniu socio povas ekzisti, tio pruvas ke la individuo havas valoron.

H.Armony: La veran socialismon deziras la anarkistoj. Oni memstarigas la socianojn de la socio, kun la granda celo forigi la sklaveman obeemon, la dependismon de la ĉefoj. Oni celas, ke ekzistu nur provizoraj konsilantaroj , ne kiel la sovetoj, kiuj havas nun la eternan profesion vivi de la proletaro, esti la eterna parazito.
En socio,en kiu regus vera socialismo,ne estus loko por parazitoj. La konsilantaro, kiu malplaĉus al la liberecane elektantaj popolanoj, ne povus eternigi la seĝojn por si mem, sed ĉiam denove estus aranĝataj elektoj.

Pelle: Ho!Jes! En aliaj socialistaj teorioj oni ofte postulas de la individuo,ke li aŭ ŝi sendiskute akceptu submetiĝi al la partio, komunumo aŭ ŝtato.
En tiuj sistemoj la libero por la individuo estas en danĝero.
La individua libero ne signifas mankon de disciplino; sed laŭ anarkista difino,ĝi nomiĝas memdisciplino, ĉar oni ĉiam devas gardi sin, ke oni ne ĝenu la liberon de aliaj kunvivantoj kiam oni postulas liberon por si mem.



Corrie: Do devas esti tiel, ke oni kunlaboru pri ĉiuj aferoj, en kiuj unu partio havu gvidantan taskon kaj la alia partio plenumantan taskon, tamen sen meti unu super la alia.

Kribo: Socialismo implicas malaperon de l'sociklasoj per efektivigo de la moto de la Unua Internacio: Ĉiu donu al la socio laŭ sia kapablo kaj ricevu laŭ sia bezono.

Pelle: Ho! Jes! Ĉiuj laboru laŭ siaj kapabloj kaj ĉiuj ricevu laŭ siaj bezonoj. Kompreneble, la propraj bezonoj devas esti tiaj, ke ili ne ĝenu aliajn kunvivantojn. Oni ne postulu pli de siaj kunvivantoj,ol oni postulas de si mem, kaj ne agu kontraŭ siaj kunvivantoj tiel, kiel oni mem ne volus ke ili agu kontraŭ oni.

Ĉiuj havu la rajton kritiki, sed memkritiko devas esti same memkomprenebla.

Ne ekspluati aliajn homojn, kiuj ne estas fortaj korpe aŭ mense, sed solidare kunlabori tiel ke ĉiuj ricevu justece sian parton de la komuna posedaĵo.

La elektebloj por la homoj devas esti senlimaj por ke ĉiuj povu libere evoluigi siajn proprajn talentojn, ĉar ni ja scias ke tio, kio por iu individuo estas tre valora, por alia povas esti bagatelo.

Kribo: La anarkistoj do estas por absoluta egaleco , ekzemple koncerne socian "salajron". Ankaŭ la Abundo-Bellamy movado subtenas la ideon de absoluta egaleco. Sed tiam estas la ŝtato, kiu disdonas al ĉiu egalece tiun socian salajron, eĉ por la senlaboruloj: studentoj, emeritoj,k.a.
La laboro estas konsiderata "socia servo", kaj ĉiu ŝuldos tiun servon al la socio,kiel nun la soldatservon al la ŝtato. La socia salajro ebligas al ĉiu havi sian parton de la produktado, laŭvole elektante la akirotajn varojn. La "socikreditanoj", kiuj ĝenerale teorie tre proksimas al la Abundo-Bellamy movado, pri tiu punkto antaŭvidas "krediton" laŭ la kapablo.
Kompreneble, la ekzisto de ŝtato kaj la devigeco ligita al la socia servo ne plaĉas al la liberecanaro!

En la socialdemokrata movado (Dua Internacio) la opinioj estas malsamaj. Iuj teoriuloj estas por salajra egaleco (ekzemple Bebel), aliaj por neegaleco (la kolektivistoj Deslinières kaj G. Renard, ekz-e). La plimulto ĝenerale akceptas la neegalecon de la salajroj sed nur en transira periodo (Kaŭcki,Menger...).

Iu: Transira periodo, kiu ofte daŭras jarcentojn!...

Kribo: Tamen, eĉ tiuj socialistoj, kiuj

akceptas la ideon pri salajra egaleco, ne fidas la homan naturon kaj kontraŭas la anarkistan koncepton de libera konsumado. La anarkistoj rebatas, ke la malordo, kiun naskus komence la aplikado de iliaj principoj, ne longe daŭrus kaj ĉiel estus malpli danĝera por la socio entute, ol sistemo starigita sur la malbona bazo de neegaleco.

Voĉo: Tion oni ja povus diskuti...

Kribo: En Francio, la CGT-sindikato, forte influata de la kompartio, tute forlasis la moton de la Unua Internacio (kaj eĉ la principojn de siaj unuaj jaroj). Multaj deklaroj de tiu sindikato aŭ de ties sekcioj, atestas pri tiu sinteno. Foje okazas, ke la CGT-proponoj pri salajroj estas eĉ pli "hierarkiemaj" ol tiuj de l'labordonantoj! (Ĉe la aŭtofabriko Citroën, CGT proponis en 1967 hierarkian diferencon de 115 ĝis 400, dum la estraro mem proponis nur 100/330).

Sed iuj revoluciaj grupoj, ĉefe depost la t.n. "majaj eventoj" vigle kritikas tiun sintenon: "Kapitalismo kaj hierarkio estas kunligitaj. Detrui unu oni povas nur detruante la alian!"

## Nur mondskala socialismo

Otisto: Sed oni forgesas en kia mondo ni vivas: tiaj ŝanĝoj estus tiel drastaj, ke ili povus vere bone efiki nur kiam la tuta mondo aplikus ilin.

Mikajim: Vera socialismo povas esti nur tuthomara, transcenda koncepto, bazo mem de la ĉiutaga vivo tuthomara, ĉar ĝi implicas la konadon de la evoluigaj leĝoj kaj finceloj de la Homaro.

Pro tio ke ĝi estas tuthomara kaj transcenda koncepto pri sociordigo, neniu popolo rajtas pretendi, ke vera socialismo konstruiĝas en la propra lando, krom se oni subkomprenigas, ke tiu "aparta konstruiĝo" konsistigas ŝtupon al vera tutmonda socialismo. Fakte, vera socialismo povas konstruiĝi nur en tuta Mondo per paca interkonsentiĝo de ĉiuj Homaranoj.

Corrie: Sed por atingi ĉi tion, oni unue devas forigi la landlimojn kaj la ĝisnunajn registarojn, ĉu demokratajn, ĉu komunistajn, ĉu diktatorecajn.

Necesas ĉie en la mondo forigi la tiranecajn sistemojn, kiel ĝis nun montris sin ankaŭ en certa kazo la komunismo , kaj ankaŭ forigi la aliajn sistemojn.

Kribo: Resume, socialismo povas realiĝi nur mondskale.


# HOMA NATURO : ĈU OBSTAKLO AL VERA SOCIALISMO ?

## Rolo de la homa naturo

Otisto: Oni forgesas por kiu oni alcelas tiun sistemon: por la homo, kiu iras sian biologian vojon sen atento je iu sistemo. Tiu homo estas egoisma kaj mi volas aserti, ke eĉ tiuj,kiuj plejmulte faris por la homaro, havis plezuron el tio, ĝojon por si mem.

Hodo: Komparu nun homojn kun bestoj, ekzemple formikoj: tiuj etaj estaĵoj estas bone kaj kooperative organizitaj. Ĉiu faras sian laboron. Eble iom bedaŭrinda estas ilia krueleco, ĉar la komuna vivo ne estas amema por la malfortaj.

Pri la homoj, mi opinias, ke, per sama organiza kooperativismo, t.e. per bona,organizita vivo, laboro,ktp, oni alvenos al pli bona vivkondiĉo. Ĉie en la Naturo temas pri Kooperativo, eĉ en la ekvilibro starigita meze de la sovaĝaj bestoj. Iuj estas necesa nutraĵo, dum aliaj estas la necesaj purigantoj aŭ detruantoj de tro svarmantaj bestoj.



Pelle: FRATECO signifas por la anarkisto: reciproka helpo (naturleĝo inter samspecaj mambestoj), kiun la kapitalisma sistemo preskaŭ mortigis, sed kiun oni devas revivigi!

Otisto: Analizu vin mem, kiu portas la standardon por frateco, kial vi laboras por la afero?

Mi tute ne volas mallaŭdi la egoismon, kiu estas tute natura; kial oni ne zorgu pri bonaj kondiĉoj por si kaj siaj plej proksimaj? Ankaŭ tion oni celas, kiam oni eniras sindikaton, ĉar tio estas pli profita.


Martine: Certe ne estas mallaŭdinda la egoismo de la homo, kiu luktas por akiri la minimumon, kiun li rajtas!

## Eduko estas necesa

Corrie: Por atingi veran socialismon necesus, ke oni unue instruu la hodiaŭajn homojn por ke ili laboru en tiu senco. Kompreneble tio donos en la komenco multe da kontraŭstaroj!

Hodo: Laŭ mi estas tie la grava rolo de moralo: ĉu la laboristoj povas ĉiam labori laŭ kaj por idealo? La plejmultaj havas nur du aspirojn:

- profiton, eĉ se la laborkunuloj devas suferi pro tiu sinteno. Plejofte mono respondecas pri tio! (ankaŭ, kial ili laboras por fabriki armilojn, eĉ defendajn?)
- nenianprirespondecon,por resti trankvilaj.





Corrie: Por efektivigi veran socialismon,ni unue devus forigi la armeojn kaj armilojn kaj eduki la homojn por ne plu esti pretaj militi, por ke regu paco ĉie en la mondo kaj samtempe evoluigi la ĝis nun subevoluintajn landojn.

Hodo: Laŭ mi, socialismo dependas nur de bona moralo inter homoj. Se ĉiu aplikus tiun teorion: "la libero de ĉiu haltas kie komenciĝas la libero de aliaj" oni ne plu bezonus pridiskuti longtempe la aferon!

Sed homo estas homo,t.e., ke ĉiu havas proprajn sentojn, ne ĉiam bonajn... Konsekvence, mia teorio estas nura utopio, kion mi bedaŭregas, ĉar egoismo regas super nia mondo.

Corrie: Ankaŭ necesas eduki la homojn en plena amo unu por la alia,sendepende de raso, haŭtkoloro aŭ io ajn nesama, do ke ili vidu ĉiun homon kiel homfraton.

Krome, por havi veran socialismon , devas esti tiel, ke ĉiu homo povas disponi la saman kvanton da ĉiuj ajn aferoj. Tio rilatas ne nur la materiajn sed ankaŭ la instruajn aferojn.

Hoko: Socialismo celas do morale la disvolviĝon de ĉiuj bonaj homaj ecoj en frateca paca kunvivado.

H.Armony: Estu libero, ĝentileco, amikeco,tio certe sonas naivece, sed la socio devas EDUKI la popolanojn en la plej liberecana senco de la vorto.

E V O L U O

K A J

N U N A J   P R O V O J

Najtingalo: Longdaŭra estas la evoluo de vera socialismo. Ni povas ĝin sekvi jam de la sklavaj konspiroj en la j.73a a.K. En la elementaj bataloj kontraŭ malriĉeco kaj mizervivo de tutmondaj amasoj. En la terkulturistaj ribeloj de feŭda epoko, de feŭdula konspiro kontraŭ imperiestroj, en la strikoj de fabriklaboristoj, en la tradeunismo, la Pariza komuno,la religiaj reformacioj kaj bataloj. La senkapigo per glavo de orministoj el Gutna-hora,Bohemio,en j.1496a. La armita ekribelo de vasta popola tavolo la 12an de junio,1848, kiu estis subpremita fare de aŭstria armeo; al ĝia malvenko kontribuis la gvidanta konsistaĵo de ĉeĥa burĝaro al kiu la batalantaj proletoj estis subigitaj.


La bohemiaj landoj tiam apartenis al Aŭstrio. La lastajn klopodojn pri socialismo kun homa vizaĝo en ĈSSR, kaj akceptebla por ĉiu,eksperimentata de ĉeĥa kaj slovaka popoloj kaj neniigita de armeoj de varsovia pakto en 1968.

La veran socialismon ankaŭ antaŭas la strikoj en Parizo, kie inteligentuloj konkorde kun laboruloj manifestaciis por pli bona kaj pli justa sociaranĝo.

Ankaŭ en aliaj landoj vidiĝis tiaj simptomoj, kiuj antaŭavizas tempon en kiu laboruloj unuigitaj kun la laboranta intelektularo prenos sian sorton kaj tiun de sia lando en proprajn manojn, elŝiregante ĝin el la manoj de potencuzurpantoj kaj for de egoismaj gvidantoj.

Hodo: Logike, socialismo devis sperti plurajn kodojn, kaj multaj doktrinoj stariĝis, ne ĉiuj perfektaj ĉar elcerbumitaj laŭ cirkonstancoj aŭ landoj, kontraŭ la nuna organizado, kiu rezultas de historiaj interhomaj rilatoj,bedaŭrinde bazitaj sur tiu ideo: "perforto faras leĝon!".

Oni estas tre malproksime de veraj disvolviĝoj de homa personeco.



Hoko: Dum nia epoko, en diversaj ŝtatoj, ekonomiaj kaj politikaj partioj provas starigi socialismon. Ĉu oni trovas la vojon pere de politiko, kooperativismo aŭ sindikatismo?

Hodo: Kooperativismo celas, ke neniu laboru sen pensi pri siaj najbaroj, kaj ke ĉiu praktiku industrion per sia laboro kaj ŝparaĵo.

Sed homa sinteno ne estas en si mem kooperativa: konsekvence la aliaj teorioj pri socialismo stariĝis kaj ofte sukcesis; sed en ili mi bedaŭras, ke sennaciismo ne ekzistas, dum kooperativismo kondukus,laŭ sia difino, al vera homaramo kaj sennaciismo,

Kribo: Interesaj provoj en la direkto al tiu vera socialismo estas, laŭ mi, kibucoj en Izraelio, produktokooperativoj en Hispanio 1936, sovetoj en Rusio de 1917 ĝis 1921, Budapeŝto 1956, memmastrumado en Jugoslavio kaj, ve, la praga printempo de 1968. En Francio, en majo 1968, aŭdiĝis multaj vere socialistaj ideoj, sed ili troviĝis ĉefe en intelektulaj kapoj. La laboristaro (escepte de la junuloj) restis ĝenerale konservativa.

(Pri socialismo ĝenerale kaj Ĉeĥoslovakio aparte jene esprimis sin kdo J.C. :

J.C : 1. La socialismo estas pli progresa sistemo ol la kapitalismo. Tial la socialismaj ŝtatoj estas pli perfektaj ol kapitalismaj.

Ĉeĥoslovakio en jaroj 1948/1967 estis lando, kie ne validis leĝoj, kie estis multaj juraj eraroj, kie estis la homoj persekutataj eĉ sen tribunala verdikto. Ĉeĥoslovakio perdis la neperfektan kapitalisman demokration, sed ne gajnis la novan, pli perfektan demokration.

2. La socialismo forigas kapitalisman klopodon pri gajno kaj enkondukas pli perfektan ekonomian sistemon.

Kapitalisma Ĉeĥoslovakio estis alte evoluinta industria lando. En jaroj 1948/1967, Ĉeĥoslovakio vivis el substanco de sia eksa industrio. Oni evoluigis la novan industrion nur unuflanke, ĝi ne kontentigis la loĝantaron. En multaj branĉoj de ekonomio Ĉeĥoslovakio iĝis en stato de afrika lando.

3. La socialisma sistemo ne konas periodojn de krizo. La ekonomio estas firma.

Ĉeĥoslovakio apartenas al t.n. "nepagipovaj landoj". Vojaĝante eksterlanden oni ne povas ŝanĝi libervolan sumon, nur certan poŝmonon, por kiu oni pagas laŭ kurzo, kiu estas kvinoble al la normala. Oni povas havi nur 300 kĉs kun si, oni ne povas en eksterlando ŝanĝi ilin. Se oni vojaĝas en socialismajn landojn, do oni povas ŝanĝi ja libervole, sed nur en Ĉeĥoslovakio, ne rekte en tiuj landoj. En Ĉeĥoslovakio ekzistas vendejoj, kie oni vendas nur por fremdaj valutoj, sed al tiuj ne apartenas valutoj de socialismaj landoj. Simile, en Orienta Germanio, estas afiŝoj en kelkaj vendejoj, ke oni vendas tie por fremdaj valutoj, sed estas tie nomataj nur kapitalismaj kaj neniuj socialismaj valutoj. Ĉeĥoslovaka registaro post januaro 1968 promesis, ke la ĉeĥoslovaka valuto estos ŝanĝebla. La monaj reguloj de ĈSSR estas ankaŭ plej bonaj el ĉiuj socialismaj ŝtatoj. En aliaj landoj oni eĉ ne povas libervole ŝanĝi sumojn por aliaj socialismaj landoj.

4. La monsistemo de socialismaj ŝtatoj estas bazita sur fido de popolo kaj sur homa laboro.


En ĉiuj socialismaj landoj estas la usona dolaro tre ŝatata. Oni distingas tri kurzojn: oficialan kurzon 7,20 kĉs, sed por tiuj asignoj oni povas aĉeti nur en specialaj vendejoj. Eble 15 kĉs ricevas la eksterlandano, kiu ŝanĝas dolarojn en la banko. Eble 36 kĉs pagas la ĉeĥoslovaka ŝtatano por 1 dolaro, se li vojaĝas laŭ invito en (kapitalisman) fremdlandon. Sed oni ne ricevas libervolan sumon, nur 5 dolarojn aŭ malpli. Nur en jaro 1968 ĝis aŭgusto oni ŝanĝis 9 dolarojn.

5. Se la ĉeĥoslovaka registaro post januaro 1968 volis realigi tion, kio en la socialismo estis promesita, ĉu ĝi estis kontraŭrevolucia? Pripensu ĉion kaj konkludu! Traduku, ĉar en aliaj soc. landoj la afero estas simila. Kial rublo ne estas same (aŭ pli multe) ŝatata kiel dolaro?

6. La reguloj pri valutoj estas en ĉiuj soc. landoj tre severaj. Kial, se la valutoj de soc. landoj estas tre firmaj kaj la krizoj de kapitalismo ne povas tuŝi ilin? Kial en soc. landoj oni tiom ŝatas tiujn nekonstantajn valutojn, ke oni ilin valorigas en diversaj kurzoj? Ĉu tiuj ĉi kurzoj sekvas la bonon de socialisma ŝtatano?)

H.Armony: Ofte oni ricevas karikaturojn de vera socialismo, ekzemple la Diktaturo de la "Proletaro", sub kiu nur la proletaro estas la suferanto.

La ĉifonologio, kiu sin prezentas kiel socialismo, ja restas ĉifonismo, kiu havas nenion komunan kun vera socialismo.



Kribo: Kun simpatio - sed tamen ne blinda aprobo! - mi konsideras la atingaĵojn en Kubo, Sovetio, kaj ĉefe Ĉinio, pere de kompartioj; en Skandinavio, Aŭstrio...pere de socialdemokratio.

Laŭ mi, bona kriterio por taksi, ĉu oni estas pli malpli proksima de socialisma stato, estas la diferencoj inter la salajroj. Tiel, Ĉinio ŝajnas nun plej "socialismema" mondparto (1/6), dum eĉ la kapitalisma Usono aspektas tiurilate pli progresema ol Sovetio (1/50). Tiu ĉi faktoro estis pli funde pri-

traktita en la debato pri "Salajra Hierarkio", kiun LJP aperigis pasintjare.

R I M E D O J

Kribo: Por atingi veran socialismon, ĉu reformoj, ĉu revolucio?

Corrie: Por havi veran socialismon, oni devas havi iun formon de komunismo (ekz-e marksismo), sed fondita sur tute alia bazo, ol ĝi estis ĝis nun. Vera socialismo ja enhavas la sencon de tuta libereco de ĉiuj homoj por iri ĉien, kien ili ŝatas vojaĝi kaj por povi diri la plenan opinion pri iu ajn afero.

Laŭ mi, tial por tiu celo taŭgas la marksismo, kune kun la plena rajto por esti libera, kiu momente regas en la t.n. demokratej landoj, sed en ankoraŭ pli forta grado .

Martine: Sed kiamaniere atingi tiun celon?

Kribo: Okcidenta Eŭropo, sub la influo de l' socialdemokratoj kaj de reformistaj kompartioj, ŝajnas preferi la parlamentan vojon.

En multaj subevoluintaj landoj, militestroj kaptis la regadon kaj provas solvi la terurajn ekonomiajn problemojn per absoluta kontrolo far la ŝtato. Sed tiu "solvo"kondukas al grasiĝo de bone vivanta malplimulto (la ŝtataj oficistoj kaj militistoj) per la ŝvito de pli kaj pli malsatanta plimulto.

Sovetio ŝajnas nun evolui sur reformista vojo. Rezultas politiko de kunekzistado, kiu ĝis nun ne malhelpis, ke okazas teruraj konfliktoj inter ambaŭ blokoj, pere de influoj kaj armilliverado al Vjetnamio, Izraelio, Egiptio, ktp...

Tiu "paca" kunekzistado estas necesa, laŭ la sovetia marksismo, por realigi en Sovetio la transiron de socialismo al komunismo. Rimarkindas, ke la difino pri "komunisma sociordo", kiu aperis en la raportoj pri la 22a kongreso de sovetia kompartio (1961) estas, laŭ mi, almenaŭ parte akceptebla de kiu ajn socialisma skolo, marksista aŭ liberecana:

"Komunismo, tio estas altgrade organizita socio de liberaj kaj konsciaj laboristoj, socio en kiu firmiĝos publika memadministrado, en kiu labori por la socia bono estos por ĉiu la unua nepra bezono kaj konscia neceso, en kiu ĉies kapabloj estos aplikataj plej profite por la popolo."

...Tiel, se ekzistas malkonsento inter la diversaj tendencoj de la lab. movado, tio estas ne pri la celo (libereca socialismo, aŭ komunismo), sed pri la uzotaj rimedoj kaj pri la ekzisto (ekzemple en Sovetio) de privilegia klaso (tekno-burokrataro), kiu povas konfiski siaprofite la atingaĵojn de la popola laboro. Krome, multaj rebatas, ke senlibereco ne povas konsistigi la bazojn de socialisma socio...

Fine, Ĉinio, kun impona loĝantaro kaj impeto, kiu ofte povas aspekti fanatiko al eŭropaj observantoj, ŝajnas nun la ĉefa revolucia forto en la mondo.

...

Tamen, laŭ mi, perforta revolucio, almenaŭ en evoluintaj landoj, povas nun nur malsukcesi kaj estigi amasbuĉadojn, kio tute ne progresigus la alvenon de socialismo. Aliflanke, mi opinias, ke la reformisma vojo estas iluzio. Tial mi subtenas la ideon pri neperforta revolucio per ĝenerala striko laŭ la skemoj proponitaj de abundistoj, neperfortaj liberecanoj, k.a. (en la evoluintaj landoj) kaj memmastrumado per kooperativoj aŭ komunumoj laŭ la kibuca ekzemplo, en la subevoluintaj. Kompreneble, ŝajnus stulte subteni maŭismon en teknike evoluintaj landoj aŭ ĝeneralan strikon en senindustria lando.

Sed aliaj vidpunktoj, laŭ mi, estas atentindaj, ĉar mi kredas, ke eĉ la plej firme bazitaj teorioj devas adaptiĝi kaj evolui laŭ la cirkonstancoj. Ekzemple, aktuale (decembro '69) mi ne tute same opinias kiel en la komenco de 1969, kiam ni ekdebatis pri tiu ĉi temo.

Neniu ja rajtas pretendi teni la nuran veron ; estas loko por multaj organiz-formoj en nia vasta mondo.

Sed tio ne estas la opinio de eksa kunlaboranto de LJP, nome, kdo Delgado-Granados (= Mello) kiu jene respondis al mi:

"Vi diris '...nenio pruvas, ke nur via (ideo pri Revolucio) estas valora k sekvinda...' . Vi eraregas! Mia ideo pri Revolucio (kiu ne estas mia persona ideo sed tiu de la milionoj da Revoluciuloj kiujn lumigas la ĉionvenka penso de Prez. Maŭ) demonstritos (= estos demonstrita) prava de la fakto, kaj sekvante ĝin, nome sekvante Marksism-Leninismon, la Penson de Maŭ Zedong, 1/3 de la Mondo sukcesis venki kapitalismon k organiziĝi laŭ Socialismo!.."

Najtingalo: La vera socialismo ne venos en akompano de perforto kaj sangaj revoluciaj faroj, ĉar tiaj praktikoj jam sufiĉe sin montris netaŭgaj. Ilia rezulto post kiam trankviliĝis la revolucia furioza ondo, trans la ferdekon ĵetitaj estis sinceraj,

senpretendaj defendantoj de socialismo akceptebla por ĉiuj honestaj homoj, tuj poste ekestas malkontento, cenzurado, suspektado, polica spionado, persekutoj kaj misuzado de juro.

Vera socialismo estas rezulto de spirita revolucio unualoke, plue ĝi estas ekkono de multaj mispaŝoj tiucele faritaj flanke de potencreprezentantoj kaj tiel kaŭzitaj domaĝoj kaj suferoj al la popoloj.

Veran socialismon povas realigi nur revoluciuloj de altmorala personeco kaj memoferemo.

<u>Mikajim:</u> Ankaŭ pro tio, ke ĝi estas pure nura koncepto, vera socialismo ne povas esti perforte trudita, sed nur instruata, predikata. Ĝi havas nenian rilaton kun nura materiismo, ido de perforto kaj idoligita raciónalismo, nepre trapasenda evoluŝtupo, kiu konkretiĝis en Usono, Sovetio, Ĉinio kaj jam Nord-Afriko, kaj nepre kondukas al neevitebla idoligita individualismo, en ribelo konstanta kontraŭ la tro postulemaj kolektivaj agoj perforte truditaj, kaj kies idoj estas anarkiismo kaj...kapitalismo ; la unua postulas ke estu nek dio, nek mastro, la dua pli ruze utiligas diojn kaj mastrojn por sia profito.

La rezulto de tiu dualismo estas la nuna tutmonda alfrontiĝo de la du "naturoj" de pura individualismo. La unua, kiu ne scias tre precize kion ĝi deziras, kontraŭ la dua, kies malutileco kaj "malkapableco" ordigi k evoluigi la Homaron nun tute malkaŝe sterniĝas antaŭ ĉies okuloj.

<u>Iu:</u> ???

## K O N K L U D E

<u>Najtingalo:</u> Ĝis la efektivigo de vera socialismo estas vojo ankoraŭ longa. Perfektaj devas esti ĝis tiu tempo ĉiuj meĥanikigiloj, aliiĝi devas la homa menskvalito, plifortiĝi la volo, plenmaturiĝi homeco.

En la fazoj de vera socialismo estiĝos laboro la plej alta moraldevo postulata de ĉiu civitano...

<u>Iu:</u> Denove labori kaj plulabori!!

<u>Najtingalo:</u> ...ĝis eksterordinaraj atingaĵoj estos konsiderataj heroaĵo, ankoraŭ nekonata en pasinto.

Ĉiu mem el niaepokuloj, havanta okulojn por vidi, orelojn por aŭdi, estas atestanto de unuaj simptomoj pri formortado de estanteco kaj pri la malhelpata generado de nova, pli justa mondo, en kiu estos libera la tutmonda laboristaro, senpera mastro de sia perfekta tekniko.

Ekestos Universala popolunuiĝo kun interkompreniĝa lingvo Esperanto. En la epoko de perfekta tekniko okazos nuligo de klasoj, la evoluinta meĥaniko, la komputoroj degrados la spiritan laboriston al laboristo priservanta sian aparaton; kaj la fizikaj laboristoj ĉe siaj malsimplaj maŝinoj ne plu uzos tiom da fizika forto kiel iam, sed estos devigataj des pli streĉi la spiriton.

<u>Voĉo:</u> Sed tio jam estas bildo de la <u>nuna</u> vivo!

<u>Najtingalo:</u> Nur tiu ĉi nova generacio, tiele armita, kapablos nuligi niajn hodiaŭajn problemojn - la klasojn, la salajran hierarkion.

Kompreneble, ke denature talentitajn kaj spirite riĉe dotitajn homojn kun aparte intensa cerbfunkcio superanta la komputorojn la tero plu naskos, kaj ankaŭ la sanaj manoj de ŝajne simpla laboristo restados plu la plej perfekta teknikilo, kiun oni ekfunkciigas tie, kie oni ferajn kolosojn ne povas instali kaj utiligi.

Maladekvata kaj ne kontentiga al niaj bezonoj estas la industrio kun sia maŝinaro, putra fariĝas nia periodo, kaj nur en la malproksimo ankoraŭ en mallumo konturiĝas la unuaj trajtoj de vera socialismo, naskiĝanta el nia ĥaoso, la nova homsocio fundamentita sur egaleco, frateco kaj libero.

<u>Kribo:</u> Eĉ se la aspektoj de la afero ege evoluis pro la disvolviĝo de la teknika progreso, la kreskanta minaco pri nuklea konflikto kaj la apero en la mondo de pli kaj pli akuta problemo pri malsato en la subevoluintaj landoj, nun pli ol iam, la strebado al vera socialismo restas aktuala.

Laŭ mi, en la nuna periodo, ambaŭ regantaj sistemoj konverĝas al ŝtatkapitalismo, jam pli malpli komplete realigita en la plejmultaj landoj.

Eble kelkaj opinias, ke tiu stadio estas neevitebla, logika sekvo de antaŭa stato. Mi kredas, ke ne, sed nun ne utilas priplori la velkintajn iluziojn. Fakte, la volo de kelkaj revoluciuloj en "favoraj" cirkonstancoj tute ŝanĝis la evoluon de l'mondo. Tio pruvas, ke la historio ne obeas pli malpli bone determinitajn leĝojn, sed ke la homa volo povas multon fari, ekzemple transsaltigi etapojn, kiujn iuj momente kredas neeviteblaj...


Tamen, vera socialismo estas atingebla nur post la malaperigo de ekonomiaj malegalecoj inter la diversaj mondpopoloj, per la forigo

de ĉiuj ajn naci- aŭ blok-limoj, la naskiĝo de sennaciecaj mondkonceptoj en la tuta homaro kaj la venko de humana racio super la kruda forto.

Iu: Li vere deliras, ĉu ne?

Kribo: (kiu nepre volas loki sian lastan elokventeron)
En tiu longa strebado necesas ĉiuj progresemaj fortoj en la mondo kaj estus stulte anatemi tiun aŭ tiun ĉi tendencon de la laborista movado nome de ŝtoniĝintaj dogmoj.

Najtingalo: Celante al vera socialismo, ni, laboruloj kaj laboranta intelektularo ne rigidiĝu en malnovaj revoluciaj dogmoj, sed mem eltrovadu la plej konvenan manieron de antaŭenmarŝo, tio egale en bonaj aŭ malbonaj kondiĉoj. Nia sinteno en societoj devas elmontri, ke ni havas egalan estimon al ĉiu.



Ne okazu, ke, venante al nia societo, kdo aŭ kamaradino el alia politika tendaro ekhavu impreson: kvazaŭ invitite al dancamuzo, kaj enirinte la dancsalonon - li trovas tie nur lamulojn!
Ni konsciiĝu pri tio, ke ne tiel tute senmanka estas nia fizionomio, estas kutimo superigi sian nacion, partion aŭ religion super tiun de áliulo, sed ni ekkonu tion, ke ni ĉiuj lernas unuj de la aliaj kaj nin ĉiujn lernigas la niaj eraroj.

H.Armony: Kropotkin, Landaŭer, Muehsam, Pfemfert, Rudolfo Rocker, por nomi nur kelkajn idealistojn, kies idealoj estas praktikeblaj se ni ne plu postkuras la falsajn ideologiojn de la partiknaboj, ĉar la sociala revolucio ja ne povas esti aĵo de iu partio, sed de la tuta, senpartia proletaro, sen kiu ne povas esti kaj ekzisti socialismo, la vera la ideala, la ĝusta....

Najtingalo: Al tiu ĉi nova mondo kontribuos ĉiuj partioj, ŝtataj sistemoj k religioj. Ni ĉiuj, ĉiu sur sia laborloko, administru kun mezurilo de bona konscienco, fajlu, poluru la krudan ingoton de nia sociaranĝo.

Iu: Ingoton??

Mikajim: Sed tiu vera socialismo, t.e. ĉiesa tuthomara interkonsentiĝo, ebliĝos nur kiam ĉiuj nuntempaj homaranaj servutuloj certos pri tio, ke ĉiuj egale profitos la evoluon de la tuta homara korpo. Alie, tiu rapidos al mempereo. Ne precipe la laboristoj bezonas tion kompreni, sed la "mondomastroj - ne, la oficialaj marionetoj - la okultaj oficantoj.
Ke tiuj nur bonvolu sincere revizii siajn malnovajn konceptojn pri tutmonda mastrado en kadro de Vero kaj Justo, kaj la pordo al plua homara evoluiĝo mem malfermiĝos. Nur tiam la "Templo" de vera socialismo ekkonstruiĝos sur la tuta Tero.

Iu: Ekzistas pordoj, kiujn necesas propramane frakasi!

Mikajim: Nur unu bazo veras en ĉiuj fakoj: la Realo.
Nur unu nepre vera agadinstigilo ekzistas: la Neceseco.

Otisto: Kie estas la pruvo, ke tiuj paŝoj vere atingigas la celon?

Mikajim: La pludaŭra ekspluatado kapitalisma de homo far homo - pli kaj pli simila al brutobredado - povos konduki nur al fiasko sur vojo de la homara evoluado... La tempo de piramidkonstruado per armeo de servutuloj vipe mastrataj kaj ĉiutage nutrataj per nura manpleno de bulboj kaj ajloj estas ja transpasita - almenaŭ ni tion esperu.
Por la konstruado de la modernaj sciencaj piramidoj kaj atingo al pli alta ŝtupo de homara evoluo, nun nepre necesas: aŭ vera socialismo, t.e. unuiĝo tuthomara al unu celo; aŭ faraona diktaturismo, kiu neniam sukcesos levi la Homaron super la stato de mumio, kaj neniam sukcesos malhelpi la aperon de nova Moseo.

Otisto: Persone, mi do ne esperas ion de ŝanĝo de la tuta sistemo, sed nur de plibonigoj de la nuna, kio kompreneble povas finiĝi je tuta ŝanĝo, sed mi tre forte supozas, ke tiu ŝanĝita mondo de la - ni diru, jaro 2000 - ne aspektos kiel socialismo-kredantoj atendas!!!

Corrie: Certe daŭros en multaj okazoj kelkaj jardekoj antaŭ ol oni povos paroli pri vera socialismo...

Pelle: Multaj certe opinias, ke miaj anarkiistaj sugestoj estas tute utopiaj, kaj oni devas konfesi, ke ne estas granda spaco por optimismo en nia nuntempa malhela mondo.
Sed laŭ prognozoj faritaj pri la tutmondo, nutroproblemo ĉirkaŭ la j.2000 montriĝas, ke se la homaro volas postvivi, ĝi devas havi novan etikon. Jes! temas pri nova etiko tutmonda. Ĉu anarkismo taŭgas tiurilate?
Mi almenaŭ kredas tion!

(provizora fino.)

Egon Göransson:

## Pri "Neoficialaj vidpunktoj pri Svedio"

### de kdo Persson en "Sennaciulo" (o)

En Sennaciulo mi legis interesan artikolon de kdo Pelle Persson. Vere ĝi kaptas mian atenton. Sub la titolo "Neoficialaj vidpunktoj pri Svedio" li prezentis kelkajn vidpunktojn legindajn kaj eĉ diskutendaj. Mi ĉi tie volas danki lin,senhonte,kaj sincere konfesi ke mi trovas ke en kelkaj punktoj ni havas saman opinion. Lia artikolo certe estas legita kun granda intereso en ĉiuj landoj, kie "S-ulo" estas eldonita.

Kiam mi vizitis Francion, mi renkontis kelkajn kamaradojn,kiuj demandis min, "Ĉu vi legis kion Pelle Persson skribis?". Tiam mi ne tion faris, sed laŭ la parolado nia mi komprenis, ke mi ĝin nepre legu. Mi ankaŭ rimarkis en Francio, ke multaj francoj nun havas viglan intereson pri nia sveda movado laborista. Se oni deziras esplori la miksekonomian vojon de privata kaj ŝtata mona sistemo reganta en Svedio, tiam eble nia Skandinavia lando povas esti bona modelo.

Atentu! Estus ja granda mensogo,se oni ne konfesus, ke la sveda laboristaro havas altan vivnivelon kompare kun la plej multaj landoj en la mondo. Malgraŭ tio, oni ne kredu, ke la sveda laboristo vivas en paradizo tera. La socialdemokrataj gvidantoj donis al ni bonan socion, sed bedaŭrinde, ne veran justecan komunumon.

Eble oni estas survoje? - Pelle Persson donas bonan ekzemplon de sia laboro (legu lian artikolon), kaj vi facile komprenas, ke ankoraŭ ni ne atingis fratecon kaj justecon unu rilate al la alia. Li vere pravas, kiam li skribas "kaj niaj estroj ĉasas nin kiel brutojn,ktp". Tion mi mem spertis kaj certe multaj kamaradoj havas saman travivaĵon. Kiel Pelle Persson, mi spertis, ke eĉ estroj, kiuj mem antaŭe estis niaj laborkamaradoj,estas persekutantoj. Tion mi vidis en la urba entrepreno kie mi deĵoras. Ĉiam ni laboristoj atente devas batali kontraŭ niaj ĉefoj, eĉ se ili venas de niaj vicoj kaj laŭte diras: "Ni estas socialdemokratoj" Estas ja konata vero, ke ne ĉiuj socialdemokratoj, kiuj atingis pli altan postenon ol simpla dungito laborista, zorgas por siaj subuloj, sed tro ofte pensas je sia propra sukceso. Mi povas mencii, ke dum la lastaj 16 jaroj mia loka sindikata asocio devis asigni niajn dungantojn. Ni venkis ambaŭfoje.

...

Kvankam mi deziras fortan sindikatan organizon, mi ne tre ŝatas ke la sindikata ĉeforganizo kaj la socialdemokrata partio estas tiel forte interligataj. La gvidantoj de ambaŭ organizoj havas saman programon kaj la aŭtoritatoj parolas belajn vortojn kaj poste tro ofte agas super la kapoj de la laboristaro. Mi estas ankaŭ kontraŭ la sindikata centraligado, estas malbona evoluo kaj ŝajnas ke unuopa laboristo ne havos eblecon kundecidi. Vere la gvidantoj jam havas tro grandan potencon rilate al la organizmembroj.

La nuna registaro kaj la sindikata movado kunlaboras; la ŝtata mono kaj la mono de la kapitalistoj estas intermiksataj. Tiel estas la sveda evoluo kaj tiel ĝi ŝajne estos. Tio ne ĉiam donas al la sveda laboristaro la plej bonan evoluon, tamen oni ne povas nei, ke la sveda laboristaro faris grandan paŝon antaŭen. Estas facile komprenata, se oni malfermas la okulojn kaj rigardas ĉien en la mondo. Mi volas substreki, ke Svedio eble ne uzas la plej bonan politikan kaj ekonomian sistemojn, sed mi ne povas imagi, ke la sistemoj en multaj aliaj landoj estas superaj al la svedaj. Kiu sistemo donus al la sveda laboristo pli bonajn vivkondiĉojn? Mi ŝatas nek la sovetian nek la usonan sistemojn. Ĉu ĉi tiuj donas al siaj laboristoj kaj ceteraj loĝantoj pli altan vivnivelon entute ol kion la sveda loĝantaro ricevas? Kaj kiel estas en la aliaj landoj?

En nia grupo sindikata ofte estas viglaj diskutoj. Bedaŭrinde nur estas, ke plejofte malmultaj ĉeestas. Por solvi ĉi tiun problemon ni fondis,antaŭ 7 jaroj, propran gazeton lokan. Ĝi faris multe por instigi la kolegojn pli aktive partopreni la sindikatajn kunvenojn. La gazeto estas libera, ĉiu ano rajtas skribi kion ajn. Tio okazigas aktivajn diskutadojn. Tio ne estas populara ĉe niaj ĉefoj kaj eĉ ne ĉe niaj kamaradoj en la sindikata estraro. Okazas ankaŭ ke ni estas kontraŭ nia estraro. Estas necese fari tion, ĉar ne ĉiam nia estraro emas solvi demandojn, kiujn ni prezentas en nia kajero. Pro tio,ni,kiuj gvidas la gazeton,devas turni nin al aliaj instituciaj kaj tie atingi justecon.
Pro tio, kaj la ĉefoj kaj la sindikato estas kontraŭ la gazeto kaj esperas ke ĝi malaperos: ĉar oni ja ne havas ŝancon intermiksi sin en

(o)En "Sennaciulo" de julio 1969,P.65.

"Neoficialaj vidpunktoj pri Svedio" (fino)

nia gazeta laboro kaj ne kundecidi pri la enhavo. Kvankam nia simpla gazeto estas tre aktiva kaj malkaŝe laboris, ŝajnas al mi, ke ni eble devas ĉesigi la eldonadon, ĉar kontraŭ la homa inerteco kaj indiferento estas malfacile batali.

Kiel Pelle Persson, mi opinias, ke la tutmonda junularo estas nia espero. La junuloj montris sian aktivecon ĉie en la mondo, eĉ en Svedio. Ĉi tie ili atentigis nin je multaj problemoj, eĉ tabuaj. Ne forgesu la okazon en Båstad (3/5-68), kie la junuloj kune kun multaj plenkreskuloj manifestis kontraŭ la tenisa konkurso inter Svedio kaj Rodezio. Sukcese ili batalis kaj malhelpis la aranĝon. Neniam mi forgesos la 20an de decembro 1967, kiam junuloj kaj maturaj personoj manifestis en Stokholmo "Por Paco en Vjetnamio". Estis tago kiam la svedaj policoj montris, ke oni povas atendi kion ajn de la sveda polica forto. Ili dum ĉi tiu tago montris severegajn agojn kontraŭ paca manifestantoj. La policistoj batadis ĉirkaŭ si per bastonoj kaj faligis interalie la filon de Alva kaj Gunnar Myrdal (Jan Myrdal). Poste oni povas legi, ke iuj el la sveda registaro (laborista) diris: "Ni havas plenan konfidon por la policista organizo". Mi ne tute tion havas, sed mi opinias, ke la junularo kaj la unuopa laboristo estu atentemaj en la rilatoj kun kaj la policistaro kaj la milita forto.

Simpla laboristo ofte estas, ĉie en la mondo, humiligita kaj pro tio estas necese, ke ni en la E-rondoj kune laboru por Unuiĝo per Esperanto.

(Malmö, 26.Julio 1969.)

Egon Göransson.

---

Pensoj en la aeron...

Se eksterteraj estaĵoj venus sur nian planedon kaj elprenus specimenojn por siaj scienculoj, ili estus en granda embaraso por verki la historion de nia Tero. Kion ili trovus?
En Saharo , sablon;
En Italio, lafon el Vezuvo;
En Aŭsŝvico...cindroj el kadavroj.

Kdo Dodinet.

---

Kdo Ch.H.Armony, P.O.Box 5171, Haifa, Israel , serĉas gekorespondantojn ĉia-aĝajn pri ĉiuj temoj kaj lit. elŝanĝado. Sin detenu partisklavoj de ĉiuj koloroj, ĉar li preferas liberpensemajn geamikojn.

"ARMONISMO" = CIONISMO = IMPERIISMO

/aŭ kiel primitivulo strebas iĝi grava politika arbitracianto/

Branko Miŝkiĉ.

Do, kiel ĉiu LJP-leganto, inkluzive redaktoron, povas konstati, Ch.Hochhauser Armony transiris fine ĉiujn normalajn limojn de kutimaj interhomaj rilatoj. Li uzis konatajn metodojn de imperiisma t.n. "flava gazetaro" por provi diskrediti min persone, morale, politike, idee. Samtempe li provas trakti kutiman LJP-leganton kiel politikan analfabeton kaj naivulon. Mi ankoraŭfoje ripetas: legantoj prijuĝu kies faktoj veras. Vere, mi neniam provis diri ion kontraŭ li persone, ĉi tion oni povas konstati. Nun li farigis precedencon: mi tute rajtas respondi al li adekvate kaj mi penos, kun pli da estimo ol li, kvankam temas pri klasa malamiko. Vere Ch.Hochhauser Armony elvomis aĵojn kiujn nek hundo kun butero povus manĝi. Historion de skribitaj stultaĵoj de tiu Dajan-botlekisto povis legantoj sekvi dum kelkaj numeroj kaj vidi evoluon. Hodiaŭ li finfine demetis la maskon: aperis lia vera vizaĝo de tipa dungita artikolverkanto kaj lakeo de imperiismo. Pli precize, temas pri jena triopo: "armonismo"=cionismo=imperiismo. Blasfemanto, koruptita politika kadavro, minus kompleksa, frustrita kaj perversa, do, profunde malsana individuo kiun admirigas la konata imperiisma politiko de "sango kaj fero". Li ĝojkrias, li ĝuas se agresa soldataĉaro mortpafas novajn centojn da palestinoj, li ĝojkrias se oni masakras novajn centojn kaj miliojn da arabaj virinoj, infanoj kaj maljunuloj, li ĝuas se polico ĝismorte torturas palestinajn partizanojn kaptitajn. Li ilin nomas "panarabaj teroristoj". Kelkaj demandoj al "Vera Socialisto" Ch.H.Armony kaj K°: kiom da arabaj domoj kaj vilaĝoj vi hodiaŭ dinamitigis? Mi diras "vi", ĉar ankaŭ vi estas unu imperiisma radeto de izraelia imperiisma maŝino. Kiom da novaj karceroj vi konstruigis kaj jam plenplenigis? Ĉu vi estas fine kontenta? Ĉu vi fine lavos viajn jam sangoplenajn manojn? Kaj vi havas kuraĝon por paroli pri "genocido" !? Jes, temas pri genocido, sed ĝus izraelia imperiismo praktikas ĝin kontraŭ palestinoj! Vi, kiel vera kaj tipa stultulo kaj fanatikulo, provas aserti ke mia agado estas "anti-semita", do, laŭ logiko, "kontraŭ-juda", nome, laŭ via logiko. Kaj mi jam multfoje esprimis mian simpation al la izraelia laboranta popolo! /bonvolu tralegi kelkajn malnovajn n-rojn/. En via jam proverba stulteco vi tute "forgesas" ke ankaŭ araboj estas semitoj , same kiel


judoj! Do,laŭ via opinio, mi samtempe estas kaj "kontraŭ-judo" kaj "kontraŭ-arabo"!?Via sistemo de rezonado estas vere idiota kaj reakciema "par excellence": vi atakas min per primitivaj insultoj,bone,tio certe adekvatas al via kutima esprim-maniero. Sed kiel vi havas ankaŭ kuraĝon por tiel fripone,malestime,malpure kaj insulte atakadi ankaŭ socialismajn landojn kaj ilian laboristan klason? Vi, kiel "Vera Socialisto" ĉiam uzas bonajn ilojn de imperiismaj splitistoj-artikolverkantoj: perforto (fizika kaj psika), senskrupuleco, mensogo,demagogio. Vi estas konstante ŝarĝita per sango,viaj manoj estas, ŝajne, malpuraj,sangoplenaj; vi estas ŝarĝita per buĉado,persekutado - tiun politikon vi imputas al araboj sed ĝuste vi estas ĝia apoganto kaj praktikanto - tiu politiko persekutas jam vin mem, viaj sonĝoj estas pezaj kaj sangaj.

Ne,mi ne deziras viziti la hodiaŭan Izraelion por "surloke konvinkiĝi kiom terure mi eraras". Kaŭzo: mi ne deziras simple "malaperi", kiel miloj da palestinaj arestitoj kaj militkaptitoj. Sed mi tre volonte vizitus iun alian Izraelion, kiu,bedaŭrinde,ankoraŭ hodiaŭ ne estas imagebla.

Fine,por mi nia "diskuto" finiĝis."Fekundan teron" por viaj pliaj "opinioj" vi eble trovos ĉe iu klubo de pensiuloj /politikaj/. La historio baldaŭ montros kiu pravis. Certe triumfos la palestina popolo!

Branko Miŝkiĉ

Red. noto: Temas pri rebato al la artikolo de Ch.H.Armony:"For la Miŝkiĉismon",aperinta en LJP n-ro 68.



---

Korespondi deziras: Lernantoj de argentina lernejo, kiuj jam interŝanĝas kun grupoj de diversaj landoj; skribu al :

Agrupacion de Esperanto
Escuela Normal n°4
Urquiza 446 "Domingo de Oro"
R A F A E L A (Sta Fe) Argentina Resp.

## Papalago:

Iĝis kutimo en Gent (Belgio), ke niaj militistoj ĉiujare eksponas siajn belajn ilarojn, kien infanoj de la lernejoj estas kondukataj de siaj lernestroj, kaj kie la infanoj povas manipuli la armilojn. Tio estas laŭ la germana modo, kion mi foje povis konstati sur foto. Do, bone videble, ke tiuj militistoj devenas de la simioj, ĉar ili faras la samon kiel la germanaj militistoj.

Tiel oni venenas niajn junulojn, instigante al malamo, perforto kaj teroro. Pasintan jaron, 4 ĝis 500 gestudentoj organizis manifestacion, portante diversajn tabulojn kontraŭ tia ekspozicio. Ili volis iri ĝis tie, sed ĉiuj vojoj estis okupitaj de ĝendarmoj kaj policistoj. La gestudentoj disiĝis en malgrandajn grupetojn, kaj tiel ili povis atingi sian celon, la ekspozicion, kie ili estis afable akceptitaj. Ili diskutis kun la oficiroj kaj suboficiroj. La oficiroj diris: ke la militarismo estas por nuntempo necesa malbono kaj estas la plej bona rimedo por ŝirmi la pacon. Iu el ili argumentis eĉ, ke la nazioj tiel bone povis enveni nian landon, ĉar tiu estis nesufiĉe armita. La gestudentoj respondis: Kion vi povas fari,malgrandaj ŝafidoj,kontraŭ malsataj lupoj kun modernaj armiloj, kaj vi kun viaj eksmodaj, kiujn la grandaj ŝtatpotencoj vendis al ni por esti malembarasitaj, ĉar tiuj estas maltaŭgaj. Simpluloj, naivuloj, kriis la studentaro! Spite tiujn kriojn, ĉiuj restis tre kvietaj kaj la polico ne devis interveni, kaj certas, ke se la gestudentoj persistos ili havos bonan rezulton.

Tiu spektaklo estas tute nova en Gent-o. Antaŭajn jarojn, oni tute ne povis imagi tiajn paroladojn, kaj nun antaŭ kelkaj tagoj mi legis, ke tiu ekspo' denove okazos. Milfoje oni povas legi pri malarmado, paca kunekzistado, ktp, kaj neniu kuraĝas doni la bonan ekzemplon.

Ekzistas ankoraŭ homoj en la mondo, kiuj tiel forte estas konvinkitaj pri sia praveco, ke ili ne povas akcepti, ke aliaj kelkfoje pli pravas ol ili. Pli frue, kiam la homoj povis nek legi nek skribi, estis facile uzi ilin por la milito. Sed ŝajnas, ke la nunaj homoj povante legi kaj skribi estas ankoraŭ egale stultaj."La gejunuloj, kiuj devus esti la estontaj bonaj gekamparanoj,estas maldike semitaj" (diro de la nederlandano Beni) .

Papalago.

Poezio

MI ĜOJAS,

Ĉar ekzistas atombombo,
kiu neniigos la homaron.
Mi konfesas kun aplombo
Per ĉi poem' ne faras mi eraron.

Ĉar ekzistas atombombo,
kiu diskriminacon ne konas
kaj pelas ĉiun en tombon,
ĉu en mizer' aŭ en riĉo vi tronas.

Ĉar ekzistas atombombo,
kiu ŝajnan civilizon ekstermas,
dum fuĝas la paca kolombo,
al kiu homar' okulojn pleje fermas.

Ĉar ekzistas atombombo,
kiu agas laŭ severa justo,
en gaje festa Hekatombo
pro la stulto de homara gusto.

(22.10.69) Dakapo.

.......................................

POR FELIĈO SUR LA TERO!

Laŭ doktrino religia
estas korpo de la homo
por animo nemortebla
nur la senvalora domo.

Multaj malsaĝuloj agas
laŭ ĉi pastra teorio,
malzorgante sian korpon,
- tute kontraŭ la racio.

Tial for la religiojn
kun la reakcia faro!
Por feliĉo sur la tero
batalegu nia aro!

Flegu vian korpon nudan
laŭ princip' de l'novkulturo
en aero, lumo, suno:
- rekompencas vin naturo!

Sana korpo, klara penso
en la servo de l'libero,
por homeca evoluo,
- nia celo sur la tero!

(kantebla laŭ "Volga-melodio") Josef Burger.

.......................................

Se vi serĉas nerv-trankvilon,
ĉesu mem vi bru-babilon!

J.B.

KRUCVORTA ENIGMO nro 31 (de kdo Milon)

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | |
| 2 | | | | ■ | | | | |
| 3 | | | | | | | ■ | |
| 4 | | | | | ■ | ■ | | |
| 5 | | | | ■ | | | | |
| 6 | | | | ■ | ■ | | | |
| 7 | | | | ■ | | | | |
| 8 | | | ■ | | | | | |

HORIZONTALE: 1.Havas 4 egalajn laterojn.2.Intermonto(r).Kiel pilko de rugbeo (r).3.Komisiito. 4.Maloftega.Nenia fariĝas sen pago(r).5.Piedvesto malordigita sen finaĵo.Agrabla dombesteto. 6.Parto de imperiestro.Malutili laŭ nova stilo(r).7.Renversita participo.Ofte sur brusto de belulino,aŭ eĉ de malbelulino(r).8.Parencas al balado(r). Diktatoro(r).

VERTIKALE: 1.Muzika verko.2.Baghy kantigis ĝin(r).3.Parteto de aviadilo.4.En anaso.5.Taĉmento(r).Demanda.6.Parenco. Grupo(r).7.Renversita participo. Rilatas al malgrandega materio. 8.Geologia etaĝo (senlifto!)

???????????????????????????????????????

Solvo de la 30a enigmo:

Hor. 1.ANARKISM.2.FOTOGRAF.3.OVOJ.IL.4.REMANTIN 5.ILOLI.KE.6.SO.IGNOR.7.M.SR.KV.8.OKTAVO.

Ver. 1.AFORISM.2.NOVELO.O.3.ATOMO.K.4.ROJALIST. 5.KG.NIGRA.6IRIT.N.V.7.SALIKOKO.8.MF.NERV.

=======================================

GEJUNULOJ AKTIVAS EN ROTTERDAM

Antaŭ du jaroj naskiĝis en Roterdamo la Junulara Kerno,el la konscio,ke nur gejunuloj kapablas ligi gejunulojn,kaj povas diskonigi kaj disvastigi E-on inter samaĝuloj neesperantistaj. En la komenco,estante nur 3 ĝis 4-ope,ni fakte ne sciis kiel komenci,sed iom post iom aliĝis kelkaj pliaj gejunuloj tiel ke por ĉi tiu sezono ni povis fari eĉ pli grandskalan propagandon: al ĉiuj elementaj lernejoj letero informanta pri skriba kurso, en lerneja gazeto artikolo pri E-instruo al infanoj, disdonado de flugfolioj,afiŝoj,artikoloj al kelkaj gazetoj, i.a. al studenta. Rezulto:unuagrada E-kurso por 31 infanoj, perfektiga por 12 pliaĝuloj.

Dum la semajnfino 24/26.oktobro okazis junulara renkontiĝo en Vogelenzang, kun vera sukceso. Ĉeestis 34 gejunuloj,inter kiuj du eksterlandanoj. La duono ankoraŭ malmulte aŭ tute ne okupis sin ĝis nun pri E-o. En tri lecionhoroj ni sukcesis entuziasmigi la gelernantojn tiom ke kelkaj aĉetis libron por memstudado kaj ke aliaj intencas partopreni buŝan kurson....Venontan printempon,ni espereble organizos alian renkontiĝon. (Laŭ Inge K.)

Eĥoj el LJP-administrejo:

En oktobro '69 okazis transloko de granda parto de LJP-administraj taskoj de Bordeaux al Laroque-Timbaut, kie nun okazas la gazet-multobligado kaj ekspedado. La ekspedado de la septembra n-ro estis eksterkutime prokrastita, kaj ankaŭ la novembra ne estis tute akurata. Ni petas komprenemon...

De nun kunlaboras la nova redakcio (Katja) kaj la stencilprizorgantaro (JF nederlanda). Sur lasta paĝo ĉi-numera vi povas legi pri la nova dispartigo de l'taskoj. La kunlaborantaro plifortiĝas. Dank'al tio plu prosperu nia gazeto kaj nia fako!

LJP-varbado: Jen la unuaj rezultoj de la varba aktiveco de LJP-kunlaborantoj. Temas pri novaj legantoj ĝis nun (15.dec)registritaj por 1970:

1. Ĉeĥoslovakio 10
2. Francio 5
3. Japanio 4
4. Britio, Nederlando 1

(Ni atendas novaĵojn el aliaj mondpartoj!)

Libroservo: Por helpi al la sendado de LJP en netranspagivajn landojn, vi povas mendi jenajn librojn al : La Juna Penso 7, rue Caussade F 33 Bordeaux(Francio) Pĉk: 3374 04 Bordeaux (monon vi povas ĝiri tiucele ankaŭ al via LJP-peranto):

| | |
|---|---|
| Agadprogramo de Kompartio de Ĉeĥoslov. | 1,80 |
| Anekdotoj pri vivo de HoChiMinh | 1,40 |
| Bapto de Caro Vladimir (miniatura eld.) | 2. |
| Ĉu ankaŭ vi scias?(por infanoj) | 8. |
| Dudek Horoj | 9,50 |
| La Faraono (tri volumoj) | 29,40 |
| Freŝa Mateno | 9. |
| Kiel esti amata | 2,10 |
| Nuntempa Vjetnamio | 2,80 |
| Parnasa Gvidlibro | 8. |
| Poeziaĵoj de Julian Tuwim | 5,40 |
| Sub la Jugo (Vazov) | 14. |
| Tragedio de l'Homo | 12,50 |
| Vuk (bestromano) | 7,50 |

Por jenaj libroj, eldonitaj en Japanio, LJP-adm volonte peras:

| | |
|---|---|
| Proleta Kurso de Esperanto (2 volumoj) | 28,50 |
| De Sezono al Sezono | 4,30 |

Ĉiuj ĉi prezoj, en francaj frankoj, entenas la afrankon.

Koresponda fako per CL: La 22a CL estos ekspedita en januaro. Ĝia temo:"Arto, ĝia loko en la vivo, ktp". Ankaŭ ne CL-anoj estas invitataj kunlabori! Kiu proponu temojn por venontaj debatoj?(prefere kun enkondukaj tekstoj!)

## K O R P O
## k a j
## A N I M O ...

Mi ne kredas je la homa animo, substanca kaj senmorta.
Mi ne kredas, ke la materio kontraŭas al spirito.
Animo estas la sumo de psikaj fenomenoj, same kiel korpo estas la sumo de organaj fenomenoj. Animo estas okaza rezulto de la vivo, karakterizo de la vivanta materio, mi vidas neniun kialon por ke la universa energio, kiu estigas la movon, la varmon, la lumon, ne estigu ankaŭ la penson.
La fizikaj funkcioj kaj la psikaj funkcioj estas solidaraj; kaj la penso estas manifestaĵo de l'organa vivo same kiel la ceteraj funkcioj de l'nervsistemo.
Mi neniam konstatis penson ekstere de la materio, ekstere de vivanta korpo; mi ĉiam renkontis nur unikan substancon, la vivantan substancon.
Kiel ajn ni nomas ĝin, materio aŭ vivo, mi kredas ĝin eterna: la vivo ĉiam estis kaj eterne estigos vivon. Sed mi scias, ke mia personeco estas nur kuniĝo de materiaj elementoj, kies diseriĝo sekvigos la totalan morton.

Roĝero Martin du Gard

trad.KB. (el "Jean Barois")

Jam planu....

vian partoprenon al la

## U N U A S.A.T - J U N U L A R A R E N K O N T I Ĝ O

en Nancy (Francio), la 16an, 17an kaj 18an de majo 1970.

Restado tre malmulte kosta: amasloĝejo, tendejo, eventuale hoteloj.

Petu klarigojn al la organizantoj:

"SAT-junularo" Hubert ROSSIGNON
34, rue Pasteur
54 - ESSEY LES NANCY (Francio)

**Niaj adresoj**

## S.A.T - J U N U L F A K O

- Sekretariino: Ĵaklino CIGNOLO, 23 rue du 14 Juillet, F 93-LE PRE ST GERVAIS (Francio) (informoj pri la JF, rilatoj kun E-asocioj, ktp)
- Rubriko en "Sennaciulo": Kdoj F.kaj L.GABALDA, 20 rue des Jardins, F 26-BOURG LES VALENCE
- Inform-fako: Kdo Frank ten HAGEN Jr, Nepveustr.33 II, AMSTERDAM 17, Overtoornseveld (Nederland)

## L.J.P - P R I Z O R G A N T O J

- Sekretariejo k Ekspedejo ĉe: Kdo Christian BAUDE, F 47 - LAROQUE-TIMBAUT (Francio) (leĝa responsulo, multobligas, administras k rilatas kun LJP-perantoj)
- LJP-redaktado: Kdino Katja LÖDÖR, Brusselsesteenweg 335, GENTBRUGGE (Belgio) (ricevas la artikolojn k redaktas ilin)
- Stencilpreparado fare de: SAT-junulfako en Nederlando.
- Koresponda fako per cirkulantaj leteroj: Gekdoj SCHNELLER, 3 Rosemont, CH 1208 GENEVE (Svis.)
- Centra kaso de LJP: La Juna Penso, 7 rue Caussade, F 33-BORDEAUX, Francio. <u>Pĉk: 3374 04 Bordeaux</u> (Kdo ALLEMANE prizorgas la kason, helpas por multobligado k ekspedado, peras por Francio)

## L.J.P.- P E R A N T O J

(enkasigas LJP-abonojn, varbas, rilatas kun LJP-sekretariejo, ĝiras al LJP-pĉk, evt raportas)

| Landoj | kotizo 1970 | kotizo 70/71 | |
|---|---|---|---|
| Argentinio | 0,8 | 1,20 $ | Argentina Esp.Junulara Organizo, Bv Oroño 866 "A", R O S A R I O |
| Aŭstralio | 1,1 | 1,65 $ | Volo GUELTLING, 5/21 A'Beckett Ave. , A S H F I E L D, NSW, 2131 |
| Aŭstrio | 23 | 35 ŝ | Anton KARNER, Gutenbergstr.14/4, A 6020-INNSBRUCK |
| Belgio | 60 | 90 f | Albert BRACKE, Tulpstr.52, G E N T , (pĉk: 5008 63) |
| Britio | 10 | 15 ŝ | Toni THOMSON, 91 Thorold Rd, I L F O R D , Essex |
| Danio | 9 | 13,5 kr | Palle CHRISTIANSEN, Ellebakken 23, DK 3460-BIRKERØD (pĉk:146902 Køb.) |
| Francio | 6,5 | 10 f | La Juna Penso, 7 rue Caussade, F 33-BORDEAUX (pĉk:3374 04 Bordeaux) |
| Germanio | 5,5 | 8,5 mk | Albert STEPHAN, Carmenstr.5, D 4-DÜSSELDORF OBERKASSEL (pĉk:9168Essen) |
| Hispanio | 55 | 85 p. | José BERNABEU, Gral Primo Rivera 6, CALLOSA DE SEGURA (Alicante) |
| Italio | 650 | 1000 l. | Giovanni MARCHIORI, Via Cantore 15 (Gall.Astra), I 37100 V E R O N A |
| Izraelio | 3 | 4,5 l. | Ch.HOCHHAUSER ARMONY, P.O. Box 5171, H A I F A |
| Japanio | 400 | 600 ¥ | M I N E Yositaka, Arai 1034, TAKASAGO , Hyôgo-ken (676) |
| Jugoslavio | 6 | 9 d. | Zijo AJDINOVIĈ, Jovana Cvijića 16/I , S A R A J E V O |
| Nederlando | 3,6 | 5,5 f | Corrie KOOIJ, Franselaan 270b, ROTTERDAM 3007 (pĉk: 1 256 397) |
| Svedio | 6,5 | 10 kr | Eva LINDKVIST, Rabygatan 30, S 216 13 M A L M Ö |
| Svisio | 5,5 | 8,5 f | Martine SCHNELLER, 3 Av.de Rosemont, CH 1208 - G E N E V E |
| <u>Alilande</u> | 1/3 | 1/2 | de jara SAT-kotizo, tra via SAT-peranto, aŭ rekte al LJP-pĉk, Francio |

<u>Netranspagivaj landoj</u>: Ĉeĥoslovakio (18/27 kr), Hungario (20/30 ft), Polio (24/36 zl), k.a. rilati kun LJP-sekretario: C.Baudé, F 47 - Laroque-Timbaut, Francio

LJP aperas ĉiun duan monaton, nur dank'al kotizoj de siaj abonantoj. Verkas ĝin la abonantoj mem. Cenzuro ne ekzistas. Ĉiu esprimu sian opinion libere. Neniu temo estas tabua. Povas aboni ajna esperantisto, juna aŭ ne, SAT-ano aŭ ne. Kiam LJP-kaso bonfartas, aperas kromaj kajeroj, senpagaj por la abonantaro; aktuale disponeblaj: Originala Kantareto, Rido sanigas! (poemaro de J.Burger), Pri Edukado, Absolutismo (Lanti), Memvola Servuto (La Boesi/ROL)...

Gérant: C.Baudé - Imprimeur: M.Allemane 7 r.Caussade 33-BORDEAUX. (Comm.paritaire: n° 39 863.)